… ĉu nova komunikado inter nacioj, en kiu Esperanto havus kernan rolon?

La Ne Registara Organizo Pangée 2.00 proponas metodon por inĝenierio pri paco, cele al kreado de civitana movado partnera kun la historiaj organizoj de Mondcivitanoj.

Okaze de la 70a datreveno de Mondcivitanoj, kiun ni festos la 19an, 20an kaj 21an de novembro 2018 en Parizo (Parlamentejo kaj sidejo de Unesko), ni revivigu idealon jam vortumitan de Sokrato (“Mi estas nek Atena nek Helena, sed mondcivitano”) per lanĉado de la unua Asembleo de la Popoloj (kaj Diasporoj loĝantaj en Francio), provante efektivigi ankaŭ la profetaĵon vortumitan en la fama teksto de Albert Camus, kiam liaj heroldoj interrompis la Ĝeneralan Asembleon de Unuiĝintaj Nacioj en 1948: “Se vi ne plenumos tiun ĉi taskon [*kunvoki tutmondan konstituciantan asembleon*], asembleo de la popoloj leviĝos el inter la tutmondaj popolamasoj”.

Do, “nome de ĉiuj popoloj, kiuj ne estas reprezentataj ĉi tie”, instige al kreado de la unuaj tutmondaj civitanaj delegacioj el ĉiuj diasporoj, ni demandas al vi, ĉu vi konas en Francio personojn el via lando, kiuj scipovas la francan lingvon.

La ideo estas unue, dum tiu ĉi unua asembleo, uzi la francan kiel ian mondan Esperanton por komuniki facile kaj efike.

Poste, pro estiĝo de aliaj tutmondaj civitanaj asembleoj per aliaj lokaj lingvoj (angla, itala, hispana, ĉina, ktp…) en aliaj regionoj de la mondo (“Pangeoj”), tuj proponi enkondukon de Esperanto kiel mondan diplomatian laborlingvon.

Fine, se ni deziros komuniki inter tutmondaj civitanaj asembleoj, ni bezonos ja laborlingvon, kaj ĉu la plej efika kaj neŭtrala ne estos Esperanto?